

5.5.1917.

393

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

CENTRA OFICEJO: 10, Rue de la Bourse, Genève (Svislando)

ESPERANTO DUM LA MILITO

Raporto kunmetita de la C. O. de UEA

Januaro 1917

A. Raporto pri la agado de UEA dum 1916.

La pasinta jaro estis por UEA periodo de dolora elproviĝo. Ne sole ĝi, kiel ĉiuj kulturcelantaj organizaĵoj, devis batali kontraŭ la malfacilaj vivkondiĉoj devenantaj el la milito, sed ankaŭ ĝi suferis neripareblajn perdojn en la unuaj vicoj de siaj gvidantoj. La 6 januaro 1916 nia kara Prezidanto kaj senlaca Esperanta pioniro, S-ro H. Bolingbroke Mudie estis dum sia milit-servo viktimo de terura aŭtomobil-akcidento, kaj, kelkajn semajnojn poste, la 11 aprilo, la amata Vicprezidanto kaj kunfondinto de UEA, S-ro Théophile Rousseau estis trafita de la morto sur la bataalkampo.

2,113.355-A-Exp.

ÖNB



+Z235775603

Ni siatempe atentigis en la oficiala organo de nia Asocio pri la meritoj kaj netakseblaj servoj de tiuj noblaj viroj, kaj ni esperas, ke, je pli bona tempo, ni povos dediĉi al la agado de ambaŭ niaj mortintoj indan rememorigon. Ni ĉiam konservos en la koro fidelan penson pri niaj fallintaj Prezidanto kaj Vicprezidanto, kiuj tiel energie servis al nia afero, kaj al Esperantismo dediĉis la plej belan parton de sia vivo.

Tiuj ĉi vortoj ankaŭ estu okazo por esprimi nian simpatian al la familioj kaj konatuloj de ĉiuj Esperantistoj mortintaj dum la milito, el kiuj multaj estis fervoraj amikoj de nia Asocio.

* * *

El la subaj raportoj oni povos konstati, ke ĝenerale nia movado kontentige eltenis en la diversaj landoj. Eĉ kelkloke ŝatindaj progresoj estis faritaj, sed kompreneble tiuj okazaj progresoj ne ŝanĝas la fakton, ke la milito grave malutilis al la kresko de nia movado.

En la momento kiam ni skribas, malproksima ankoraŭ ŝajnas la tago, kiam ni povos libere rekomenci vastampleksan agadon. Sed kiom ajn malproksima estas tiu tago, nia devo estas firme



teni en niaj manoj la verdan standardon kaj ĉion eblan fari por ke nia afero vivu kaj sukcese rezistu je la dissolve efiko de la milito. Se pro aliaj interesoj kaj momenta senkuraĝiĝo, la fidelaj Esperantistoj laciĝus en sia penado, eĉ kun la intenco denove interesiĝi kiam la tempo estos pli favora, nia movado certe elirus el la krizo treege malfortigita, kaj, anstataŭ esti pretaj je la horo de pli intensa agado, ni baraktus en sen-nombraj internaj malfacilaĵoj kaj multon devus fari por restarigi tion, kion nia malatento estus lasinta fali. Ni do alvokas je ĉiuj konsciaj Esperantistoj, ke ili nepre daŭrigu subteni niajn organizaĵojn dum tiu malluma periodo.

Nur dank'al ilia fidela helpado, ni povos venke trapasi la plej gravan eksteran krizon, kiu iam minacis la ekziston de nia movado.

* *

* *

Dum la milito, la tasko de la C. O. de UEA estis gvidata laŭ du vidpunktoj: unuflanke, kuni teni la rilatojn inter la Esperantistoj kaj meti je ilia dispono internacian centron, aliflanke adapti nian agadon al la militbezonoj kaj laŭeble helpi al la viktimoj de la nunaj okazantaĵoj.

Rilate al la unua celo, ni povas diri, ke la rezultatoj estas sufiĉe kontentigaj. Dank'al sia sidejo en neŭtrala lando, nia Oficejo povis resti en rilatoj kun la ĉiunaciaj Esperantistoj kaj Esperantistaj organizaĵoj, malgraŭ diversaj poŝtaj malfacilaĵoj; tiamaniere la internaciaj interrilatoj ne estis tute rompitaĵ. La administrado funkciis regule. Je la komenco de la lasta jaro ni eldonis Jarlibron, kun iom malpli granda amplekso, sed niaj financaj rimedoj ne permesos al ni aperigi novan dum la milito; cetere ĉar la ŝanĝoj estas nun malmultaj, oni ankoraŭ povos uzi la eldonon de 1916. Per la publikigo de sia Jarlibro UEA donis konkretan pruvon pri sia ekzisto kaj dum milita utilo.

Al nia movado multe helpas la regula apero de la gazeto „*Esperanto*“, kiu estas nun la sola internacia ligilo inter la Esperantistoj; ĝin abonas la plimulto de niaj membroj restintaj fidelaj nuntempe. Dank'al specialaj klopodoj la cenzurmalthelpoj povis esti, almenaŭ parte, venkataj, kaj nia gazeto havas, kiel kutime, tute diversnacion legantaron.

Ni ankaŭ laŭeble favoris la propagandon ĉe la kaptitejoj kaj internigejoj, kie Esperanto estas nun instruata. Ni sukcesis interesigi al Esperanto

la estraron de la Neŭtrala Konferenco en Stockholm, kiu publikigis en nia lingvo unu el siaj eldonaĵoj. Fine de la jaro, ni aranĝis ĉe la naciaj Esperantistaj societoj enketon pri la stato de nia movado dum la milito, kies rezultatojn ni publikigas aldone al tiu raporto.

Koncerne la agadon por la militviktimoj, ni ankoraŭ povis plenumi ŝatindajn servojn. Pro la rehejmigo de multaj civilkaptitoj, la fondo de specialaj institucioj por milithelpado kaj la parta restarigo de la poŝtaj rilatoj, la nombro de la transsendataj leteroj multe plimalgrandiĝis kompare kun la antaŭa jaro. Spite tio, granda estas ankoraŭ la nombro de la plenumitaj servoj: serĉado de malaperintoj, transsendo de leteroj kaj monsumoj, klopodoj diversspecaj. Ni ĝojas, ke ni tiamaniere povas iel utili al multaj kompatindaj militsuferantoj.

La sama sento pri niaj dummilitaj devoj instigis nin sendi al ĉiuj Esperantistaj militkaptitoj de ni konataj Kristnaskan donaceton en la formo de pakaĵo kun manĝaĵoj kaj tabako. Ĝi estu atesto pri nia simpatio kaj pri la Esperantista solidareco en la malfeliĉo.

* * *

Dum 1916 la nombro de la membroj atingis 2734 (ĉiuj kategorioj kune) kontraŭ 2704 en 1915. Nedube estas, ke eĉ nuntempe multe pli alta nombro estus atingebla, se ĉiuj niaj Delegitoj, anstataŭ nur kelkaj, bonvolus energie klopodi por kolekti la aliĝojn. Por ke ĉe administracioj, internaciaj societoj kaj gravaj oficejoj U E A povu inde reprezenti la Esperantistan movadon, necese estas, ke ĝi povu agi en la nomo de granda nombro, ne nur de kelkaj miloj. La samideanoj en ĉiuj landoj konsciu, ke aliĝante al U E A ili subtenas morale kaj finance klopodojn tre utilajn, kiujn ili izole aŭ eĉ la naciaj societoj ne povus entrepreni.

Pro la jam aluditaj kaŭzoj, la movado de la korespondaĵoj malplimultiĝis: 31,199 poŝtaĵoj dum 1916 kontraŭ 97,415 dum 1915. La bilanco de U E A, publikigita en la decembra numero de „*Esperanto*“, montras deficiton da fr. 100. Ĉar tiu relative favora rezultato estas ŝuldata al diversaj cirkonstancoj, kiuj verŝajne ne ripetigos dum la nuna jaro, estas nia devo atentigi pri la neceseco de pli altaj enspezoj, precipe el kotizaĵoj.

Je la fino de 1916 ni havis la plezuron anonci, ke ĉiuj atestoj de la Garantia Kapitalo estas menditaj. Laŭ nia propono, la Komitato decidis la kreon de cent novaj atestoj, kiuj valoras po 125 fr.

kaj estas mendeblaj je la samaj kondiĉoj kiel antaŭe. Ni rememorigas, ke la akiro de atesto rajtigas je la dumviva membreco de UEA kaj je la konstanta abono al la gazeto „*Esperanto*“ (luksa eldono). Ni esperas, ke inter niaj membroj troviĝos kelkaj, kiuj bonvolos helpi al la plifortigo de la financa fundamento de UEA per mendo de unu aŭ pluraj atestoj.

Finante tiun koncizan raporton, ni deziras esprimi niajn korajn dankojn al la fervoraj oficistoj ĉe nia Centra Oficejo kaj, ĝenerale, al ĉiuj samideanoj, kiuj iamaniere helpis al la bonstato de UEA dum tiu espereble baldaŭ finota krizperiodo.

Genevo, 27 decembro 1916.

La Direktoro: H. HODLER.

*B. Raportoj pri la stato de Esperanto en
la diversaj landoj.*

La respondoj al tiu enketo devenas plejparte el la naciaj Esperantistaj societoj, al kiuj ni sendis specialan demandaron pri la jenaj punktoj:

1. Influo de la milito je la Esperanto-movado de via lando.
2. Influo de la milito rilate al la funkciado de via societo.
3. Influo de la milito rilate al la sintenado de la nacia gazetaro pri nia lingvo.
4. Nombro de la kursoj. Novaj grupoj fonditaj. Ebleco de Esperantaj ekzamenoj. Vendado de Esperantaj verkoj.
5. Ĝustaj faktoj rilate al la uzado de nia lingvo dum la milito.
6. Ĝenerale, ĉiuj karakterizaj informoj pri la progresado de nia movado aŭ novaj direktoj de nia propagando.

* * *

El kelkaj landoj, ni ne ricevis respondon de la koncerna nacia organizaĵo. Ni do publikigis pri ili koncizan paragrafon laŭ la informoj, kiuj nin atingis dum la jaro. Ilian nekompletecon oni bonvolu senkulpigi. Tiuj artikoloj estas antaŭmontrataj per la signo *.

Aŭstrio-Hungario.

* La milito ŝajne malhelpis sufiĉe grave la movadon en tiu lando. La gazetoj, kiuj estis eldonitaj antaŭ la milito ĉesis, krom la „*Verda Standardo*“, kiu aperis ĝis 1915. Malgraŭ la malfavoraj kondiĉoj, kursoj estis aranĝitaj en kelkaj urboj, speciale en Innsbruck, Katzenau, Klagenfurt, Olomouc, Plzeň, Praha, Villach, kaj Wien. Ĉe iuj militkaptitejoj, Esperanto estis propagandata. Pro cenzuraj malhelpoj la poŝtaj rilatoj estis ofte malfacilaj kun la multenombraj Esperantistoj de tiu lando. La sinsekvaj bataladoj en Galicio, kie nia movado estis sufiĉe vigla, kompreneble multe malhelpis la Esperantan agadon.

Balkanlandoj.

* Ni povis ricevi nenian certan informon pri tiuj landoj dolorige frapitaj de la milito. Neniu gazeto plu aperas. Antaŭ la okupo, kelkaj kursoj okazis en *Serbujo*, kaj nuntempe ankoraŭ la movado ŝajne daŭrigas en kelkaj urboj de *Bulgarujo*.

Belgujo.

* Ĝis 1916 estis preskaŭ neeble ricevi informojn el tiu lando. El lastatempaj komunikoj rezultas, ke en kelkaj lokoj la fidelaj Esperantistoj daŭrigas kunveni. La belgaj Esperantistoj rifuĝintaj en Britujo aranĝis kongreseton. Vigla propagando estis farita ĉe la belgaj internigitoj en Harderwijk kaj Zeist en Nederlando.

Britujo.

Ĝenerale la milito iom malhelpis la movadon, sed malpli ol ni atendis. Kaŭzoj: la manko de mono, la uzo de mono kaj tempo en aliaj direktoj, pli granda elspezo kaj malpli granda enspezo de la Esperantistoj, k. t. p. Sed ĉio montras, ke la nuna situacio, t. e. la kreskanta intimeco de rilatoj inter Britujo kaj la kunbatalantaj nacioj, estas tre favora al la propagando kaj pretigas grandan kampon por efika laboro post la milito. Malgraŭ ĉiu malhelpo la plimulto de la grupoj regule kunvenadas; multaj konferencoj estas aranĝitaj de la regionaj federacioj kaj la ĉiujaraj naciaj kongresoj okazas kiel ordinare: en Bath 1915, en York 1916 kaj (okazonta) en Blackpool 1917. En Bath ĉeestis proksimume 200 kongresanoj, kaj en York pli ol tiu nombro, malgraŭ la manko de malkaraj fervojaj biletoj kaj la nuligo de la kutima publika libertago (Pentekosta lundo). Ĉe ambaŭ kongresoj estis aranĝitaj kongresetoj de belgaj rifuĝintoj Esperantistaj. En Skotlando ankaŭ okazis sukcesaj kongresoj, en 1915 (Hamilton) kaj 1916 (Linlithgow). Fine la milito ebligis diversajn novajn metodojn de propagando, ekz. en la komercaj rondoj, la armeoj, la hospitaloj, tendaroj de internigitoj k. t. p.

La B. E. A. partoprenis la ĝeneralan malakceladon de Esperantista agado supre nomitan, sed ĝi daŭrigis aktivan kaj efikan funkciadon en ĉiuj fakoj, regule aperigis siajn du monatajn gazetojn kaj subtenis laŭeble ĉiun propagandan klopodon de la samideanaro. La enspezoj de la Asocio malpliiĝis precipe en la komencaj monatoj de la milito, sed la elspezoj ankaŭ

estis malpliigitaj per zorga ekonomio; novaj anoj anstataŭis la ekŝigintajn kaj la jaraj deficitoj estis ne ekscese pli grandaj ol antaŭe. Tiuj deficitoj estas, kiel kutime, pagataj per speciala garantia kapitalo starigita ĉiujare inter la anoj.

Krom la ordinaraj kotizoj la Asocio kolektis proksimume la jenajn sumojn de aŭ pere de siaj anoj dum la lastaj du jaroj: Du aŭtomobiloj „Esperanto“ N-ro 1 kaj „Esperanto“ N-ro 2 donacitaj al la Belga Ruĝa Kruco £ 800 —. Saldado de deficitoj 1914, 1915 kaj duono de 1916 £ 700 —. Oni povas aldoni, ke tiuj sufiĉe konsiderindaj sumoj konsistis grandaparte el multege da malgrandaj donacoj. La aktivaj anoj de la Asocio tiamaniere bone certigis sian unuaniman kredon en la movado kaj la Asocio trankvile iras sian vojon.

Rilate al la nacia gazetaro estas necese memori, ke pro la malpliigo de provizo de papero, kosto de laboro, kaj aliaj militaj malfacilaĵoj, ĉiuj britaj ĵurnaloj estas malpli ampleksaj ol ordinare kaj sekve ne disponas multan spacon por aferoj por ili de duagrada graveco. Malgraŭ tio multaj artikoloj kaj tre multaj aludoj, ĝenerale favoraj, pri Esperanto aperadas en la gazetaro, kaj ĝia sinteno estas certe ne malpli simpatia ol antaŭe.

Fidinda statistiko pri la nombro de kursoj ne estas havebla, nek pri novaj grupoj, ĉar kvankam kelkaj nove fonditaj grupoj aliĝis al la B. E. A. ekzistas multaj, kiuj tion ne faris: plie kelkaj malgrandaj grupoj pro mobilizo aŭ aliaj portempaj distraĵoj de la anoj aŭ malaperis aŭ por la momento restas neaktivaj. Sed oni povas diri resume, ke multaj kursoj kun aŭ sen

oficiala subteno okazadas, kaj la malpliigo de la nombro, se efektive estas malpliigo, estas malpli granda ol oni povus atendi. Sufiĉa nombro da kandidatoj plenumis la ekzamenojn de la Asocio, kiuj okazis almenaŭ ses fojojn ĉiujare kiel ordinare.

La vendado de libroj malpliigis en la komenco de la milito, kaj restas ankoraŭ malpli alta ol antaŭe, sed ĝi estas sufiĉe bona kaj regula, kaj lastatempe kreskas.

La Asocio multe interrilatiĝas kun ĉiuspecaj samideanoj en la diversaj armeoj, militŝiparoj, k. t. p. kaj estas certe, ke la lingvo estas sufiĉe vaste uzata kaj propagandata en militaj rondoj. La Asocio sendis librojn kaj propagandilojn (aĉetitajn aŭ senpage) al ĉiuj partoj de la kampo de milito; multaj samideanoj korespondas kun soldatoj en kaj pri Esperanto, kaj la kreskanta nombro de samideanoj en la brita armeo propagandas la lingvon hejme kaj eksterlande.

Estas bone atentigi pri la propagando en la komercaj rondoj en Britujo mem aŭ tie iniciatata. Inter aliaj interesaĵoj oni povas citi gravan diskuton pri neceso de internacia komerca lingvo, kiu okazis ĉe la urbkonsilantaro de Londono dum la somero de 1916, paroladojn pri la sama temo ĝin sekvintajn kaj fine la tiel nomatan „Internacian Eksperimenton“, laŭ kiu oni kondukas kursojn por komercistoj en Londono kaj aliaj urboj kaj samtempe en multaj alilandaj urboj, kun la celo, ke post tri monatoj oni interrilatigos la lernantojn kaj tiel pruvos al la komercistoj la veran facilecon kaj utilon de la lingvo. Tiaj aferoj tendencas nepre al unu fino, la neevitebla akcepto de Esperanto en la komerca mondo.

En alia direkto oni ankaŭ nun propagandas en Britujo kun nova energio, nome rilate al la edukado kaj instruado. Nova kampo por tio aperis pro la fakto, ke la Registaro kaj edukistoj ĝenerale serioze esploras la problemon de lingvoinstruado en lernejoj. La Esperantistoj laŭoportune atentigas pri nia lingvo. — Oficejo de *Brita Esperanto Asocio*.

Danujo.

Dum la milito, la movado malvigliĝis. Ĉu la milito estas la kaŭzo aŭ nur la preteksto, estas malfacile diri. Oni tamen vidas la samajn faktojn en aliaj idealaj movadoj. Estas kvazaŭ ĉiu idealismo estis sufokata en la milita atmosfero, kiu atingis nin sub diversaj aspektoj. Ne la idealistoj forlasis siajn idealojn, sed ili staris senhelpaj — propagando estis neeblo —; tion ankaŭ sentis la Esperantistoj. Dum la tria militjaro ŝajnas kvazaŭ denove aperas intereso por ĉio, kio malfermas novajn vojojn al la estonteco.

En kelkaj provincoj la klubaj kunvenoj ĉesis pro tio, ke la plej multaj el la membroj, ĝenerale junaj viroj, estis vokataj al soldata servo; kelkaj el ili tamen vizitis la Kopenhagajn klubojn dum restado en la ĉefurbo.

En kelkaj gazetoj aperis informoj pri Esperanto. Fakaj gazetoj akceptis artikolojn ekz. instruistaj, pacifistaj k. t. p. Laŭ nia scio 5 kursoj okazis dum 1914, 3 dum 1915, 4 dum 1916. Ekzamenoj ne okazis. Novaj kluboj ne fondiĝis.

Centra Dana Esperanta Ligo dum marto 1916 publikigis 16-paĝan propagandan broŝuron. La Esperanta Unuiĝo de Danaj instruistoj disdonis senpage al lernejoj kaj geinstruistoj 2000 ekz. de „Esperanta Raporto de C. D. E. L.“. Dum la lastaj tri jaroj estis venditaj ĉiujare ĉirkaŭ 200 ekz. de la Esperanta-dana vortaro de P. A. Duckholm. La gazeto *Esperanta Raporto* aperis regule ĉiumonate.

Nia Oficejo faris grandan laboron, precipe en la komenco de la milito. La danaj Esperantistoj faris multajn servojn al la trapasantaj Esperantistoj, precipe Rusoj kaj Poloj. Ili ankoraŭ nun peradas inter germanaj, rusaj, anglaj, polaj, rusaj samideanoj kaj militkaptitoj en ĉiuj landoj.

Ses paroladoj estis faritaj dum 1914, kvin dum 1915, dek-du dum 1916, laste plejparte de F-ino Noll en diversfakaj societoj.

Dank' al la servoj, kiujn la Esperantistoj jam faris al la pacifista movado kaj ilia propagando dum jaroj en ĉi tiu movado, ni povas kalkuli la pacifistojn inter niaj specialaj amikoj, kaj ni daŭrigos celkonscian propagandon inter pacifistoj en la tuta lando, ĉar speciale tiuj homoj bezonos la lingvon tuj post la milito.

Alia fako, kiun ni intencas prilabori, estas la turistoj, kiuj sopiras je la ĉiujaraj ekskursoj en eksterlando. Multaj aliaj laboroj atendas nin precipe kun la venonta kongreso antaŭ la okuloj, sed speciale la laboro en la suprediritaj movadoj ŝajnas al ni necesaj, kaj ni esperas, ke en la aliaj landoj oni volos atenti la samajn. — *Centra Dana Esperantista Ligo, F-ino M. Noll, prezidantino.*

Francujo.

La milito kaŭzis gravan halton de la Esperanta movado sekve de la mobilizo de la tre granda plimulto de l'grupestraroj; plie, ĉar la plej agemaj centroj estas en la okupitaj regionoj de Nord-Francujo, la rilatoj kun ili fariĝis preskaŭ neeblaj.

La estraro de la S. f. p. E. kunvenis kelkfoje, sed krom la aperigo de „*Bulteno*“, kiu eliris kvar fojojn dum 1915, ĝi ne povis efike labori, ĉar la plimultaj grupoj ne respondis al la cirkuleroj kaj leteroj.

La gazetaro malmulte okupiĝis pri Esperanto, ĝenerale ne tre favore.

Kelkaj kursoj daŭrigis, ekzemple en Beauvais, dank' al la nelacigebla propagandisto S-ro Demarcy, en Angers, en Lyon, en Paris, en Alger, sed ni malofte estis oficiale informitaj. Ekzamenoj okazis en Angers, Beaujeu, Beauvais, Boulogne s. Mer, Alger, k. t. p. La vendo de libroj ne haltis, sed estas nun malforta.

La grupo de Le Mans, kelkaj aliaj kaj la Centra Oficejo en Parizo povis fari servojn al multaj militkaptitoj, ĉu germanaj en Francujo, ĉu francaj en Germanujo, dank' al Esperanto.

Ekster la Oficiala Bulteno de la S. f. p. E. la Centra Oficejo publikigis plurajn N-rojn de „*Informa Bulteno*“. Plie, speciala komitato: „Por Francujo per Esperanto“ aperigis flugfoliojn pri la milito. La gazetoj „*Le Monde Espérantiste*“ kaj la „*Fluganta Skribilo*“ daŭrigis aperi post kelktempa haltado.

Citinda estas la cirkulero komunikita de la ŝtata subsekretario de la saneca fako al la direktoroj de la regionoj por informi ilin, ke li metas je ilia dispono

dulingvajn lernolibretojn „Esperanto-Ruĝa Kruco“, disdonotajn en la sanitaraj grupoj al la kuracistoj kaj flegistoj rilatantaj kun diversgentaj vunditoj. Sekve de tiu cirkulero la saneca servo mendis 10,000 ekz. de la Ruĝ-Krucaj libretoj. — *Franca Societo por la Propagando de Esperanto, Th. Cart, vicprezidanto.*

Germanujo.

Komence de la milito oni opiniis, ke ĝi malfavore influus la movadon aŭ eĉ haltigus ĝin. Sed baldaŭ montriĝis la firma volo de fervoraj Esperantistoj, spite de la milito, ne laciĝi en la propagando de nia afero. Diligente oni daŭrigis labori. Se la sukcesoj ankaŭ ne similas al tiuj de la paca tempo, evidentiĝis tamen, ke celkonscia varbado fine havos sukceson, eĉ dum tempo kiam aliaj interesoj estas pli proksimaj, kaj la uzado de nia lingvo kun la eksterlando ne aŭ tre malmulte estas ebla pro la cenzurkondiĉoj.

Granda parto de la membroj de la Asocio, ĉirkaŭ 900, estas mobilizitaj, inter ili la prezidanto kaj la sekretario. Pro tio la rilatoj kun la grupo fariĝis malfacilaj. Kelkaj grupoj eĉ devis interrompi la agadon, ĉar la pli multaj membroj estis soldatigitaj. En multaj okazoj stariĝis anstataŭantoj, laborantaj kun granda fervoro.

La gazetaro ne estis malfavora; pro la kvanto de aliaj taskoj ĝi ne povis doni al Esperanto tiom da atento kiel antaŭe. Aliaj, ŝajne pli gravaj artikoloj, estas preferataj. Estas facile kompreneble, ke, kiam la raportoj pri la militokazintaĵoj plenigas la kolonojn,

artikoloj pri internaciaj movadoj devas cedi al la pro-
naciaj aferoj.

Pri la nombro de la kursoj precizaj montroj ne povas esti donataj. „*Germana Esperantisto*“ regule informis pri tio. Ĉe la Saksa Esperanto-Instituto okazis ekzameno pri kapableco. La vendo de lernolibroj malgrandiĝis; kontraŭe, pli da legaĵoj estis aĉetitaj, ankaŭ de la Esperantistoj sur la batalkampoj.

Citinda estas la fakto, ke la militkomunikaĵoj germanaj, aŭstro-hungaraj kaj turkaj estas disvastigitaj pere de Esperanto. El tio rezultis grava korespondado kun la eksterlandaj samideanoj; tiu korespondado estas kolektita kaj eldonita de la Unuiĝo de la Esperantogrupoj en Leipzig sub la titolo „*Stimmen des Auslandes über den Krieg*“ (Voĉoj de l' eksterlando pri la milito). Krom tio ni aranĝis du specialajn sekciojn, okupiĝantajn pri la serĉado de civil- kaj militmalaperintoj. Ĉi-tiu sekcio laboras kun la koncerna oficiala oficejo, kun la ĉefaj Delegitoj de UEA en la neŭtralaj ŝtatoj, Svisujo, Nederlando kaj Danujo. Per ĉi-tiu sekcio ni sukcesis trovi la adresojn de personoj apartenantaj al malamikaj nacioj. Ekzemple, ĝi ricevis de Bordeaux ĉirkaŭ 680, de La Roche sur Yon 45, de Le Mans 160 informpetojn, el kiuj 10 % povis esti responditaj. La alia sekcio prizorgis la sendon de Esperantaĵoj al la militkaptitoj. Ĝia laboro estis speciale vigla. (Vidu la aldonojn al tiu ĉi raporto.)

Kiel progreson de nia afero ni povas citi la fondon de nova gazeto „*Esperanto-Spiegel*“ (Esperanto-Spegulo), monata gazeto por la akcelo de la naciaj kaj sciencaj aspiroj de la germanaj Esperantistoj. Ĝi al-

prenis kiel taskon la rebaton de kontraŭ-Esperantistaj celadoj kaj asertoj per artikoloj kun ekonomia kaj scienca enhavo. — *Germana Esperanto-Asocio.*

Aldono A. — La militkaptitoj en Germanujo.

Tuj post la komenco de la milito ni entreprenis la agadon por la militkaptitaj Esperantistoj. Sciiginte novan adreson, ni sendis leteron kaj presaĵojn al la persono. Kiam aperis la unua listo de militkaptitaj Esperantistoj en la gazeto „*Esperanto*“ ĉiu samideano ricevis leteron en Esperanto kun germana traduko kaj ekzempleron de la Esperanto-Biblioteko Internacia. Multaj ĝojaj respondoj alvenis en franca, germana kaj Esperanta lingvoj. Militkaptitoj kaj internigitaj petis alsendon de lernolibroj en franca kaj rusa lingvoj, ĉar ili tuj faris propagandon kaj donis lecionojn. Nia provizo en la librejoj baldaŭ elĉerpiĝis, ankaŭ la ŝlosiloj. La firmo Ader & Borel kolektis per alvoko en „*Germana Esperantisto*“ ŝlosilojn en ĉiuj lingvoj por kontentigi pluajn petojn. Volonte multaj posedantoj sendis ŝlosilojn. Ankaŭ oni kolektis monon por sendi pli grandajn librojn. La laboro kreskis, tiel ke la agado devas esti duonigita; unu persono prizorgis la eksterlandanojn en Germanujo, alia la germanojn en eksterlando. Ne ĉiam la afero marŝis laŭdezire. Kelkfoje la Esperanto-teksto sur la poŝtkartoj estis forigita; aliffoje libroj revenis kun surskribo „Neallasebla pro manko de tradukisto“. Ĉar la libroj senditaj de firmo Ader & Borel ĉiam alvenis, ni sendigis lasttempe ĉion pere de tiu firmo. La francaj kaptitoj estas tre fervoraj pro-

pagandistoj; ili uzas kun bona sukceso la „senperan metodon“. Ni ricevis leterojn kaj poŝtkartojn el 29 germanaj kaptitejoj. La organizon de la servado al militkaptitoj prizorgas la germana Esperanto-Centro en Dresden. — *S-ino Prof. M. Hankel.*

Aldono B. — Esperanto kaj militkaptitoj en eksterlando.

Sekve de diversaj instigoj mono estas kolektita por sendi legaĵojn kaj lernolibrojn al germanaj kaptitoj. Ĝis oktobro la kolektita sumo atingis M. 255, el kio pli ol la duono estas elspezita por tiu celo. Laŭ ricevitaj respondoj ni faris grandan plezuron al la Esperantistoj kaj sukcesa propagando estas farita inter la kaptitoj por nia afero. Oni ankoraŭ monkolektos por la nomita celo kaj sendos librojn. — *R. Maske.*

Hispanujo.

* La movado ŝajne estis sufiĉe vigla precipe en Katalunujo. U E A havas multajn membrojn en Palma de Mallorca kaj en Sevilla.

La gazeto „*Kataluna Esperantisto*“ regule aperis ĝis la printempo 1916 kaj de tiam ĉesis. Fondiĝis Aragona Esperantista Federacio, kaj oni projektis la kuniĝon de la diversaj regionaj federacioj en unu Hispana Esperantista Konfederacio. Ni ĝis nun ne aŭdis pri la realigo de tiu plano.

Kursoj okazis en pluraj urboj, nome Barcelona, Baracaldo, Bilbao, Las Palmas, Madrid, Palma, S. Feliu

de Guixols, Sevilla, Tarragona, Terrassa, Tolosa, Valls, Zaragoza, k. t. p. S-ro Graŭ faris paroladvojaĝon en diversaj katalunaj urboj. Kataluna Esperantista Kongreso devis okazi en Reus la 11-13 junio 1916.

Italujo.

* La milito grave malfaciligis la poŝtajn rilatojn kun la itala Esperantistaro, ĉar, malgraŭ diversaj klopodoj, la itala poŝtkontrolo ĝis nun ne enlasas Esperantajn korespondaĵojn. Spite tiuj malfacilaĵoj, la Itala Katedro de Esperanto (sidejo en Bologna) daŭrigis sian agadon, organizante kursojn kaj paroladojn, propagandante ĉe la militkaptitejoj, aranĝante ekzamenojn. La gazeto „*L'Esperanto*“, kiu aperis ĝis somero 1916, devis ĉesi pro mobilizo de sia redaktoro. Novaj grupoj fondiĝis en Marsala kaj Siracusa.

Nederlando.

La influo de la milito sur la movado ne estis tre granda. En la unua momento ĝi kaŭzis iom da malordo, pro kio nia organo ne aperis en la unuaj du monatoj de la milito; poste ĝi ree regule aperis. Post la unuatempa konsterno kaj konfuzo la movado baldaŭ reiris sian ordinaran vojon.

La funkciado de nia societo tial ne suferis interrompon aŭ grandan malhelpon. Povas esti, ke kelkaj membroj ekŝiĝis timante, ke la pagado de la kotizaĵo fariĝus tro ŝarĝa pro la plikariĝo de la vivo, sed ili ne estis multaj, kaj la nombro de la membroj ne multe malpliĝis.

Pri influo de la milito rilate al la sintenado de la nacia gazetaro, nenio estas konata al mi. Estas kompreneble, ke la ĉion superanta interesigo por la militaj okazantaĵoj tre influis je la nombro de la presitaj artikoloj pri Esperanto. Plie la informoj el eksterlando estis multe malpli ol antaŭe pro la neapero de multaj eksterlandaj Esperantaj gazetoj. Iom post iom tamen la nombro rekreskis, kvankam ĝi ankoraŭ ne reatingis la grandecon antaŭmilitan. Mi ne povas konstati, ke la favoreco aŭ malfavoreco de niaj naciaj gazetoj vidigis ian ŝanĝon.

Pri la nombro de kursoj granda ŝanĝo ne estas konstatebla. Tri novaj grupoj aliĝis al nia Societo, nome du en Dordrecht kaj unu en Hengelo. La ekzamenoj regule okazis dufoje en jaro.

Estas farita propagando inter la internigitaj belgaj soldatoj, precipe en la internigejo de Harderwijk. Tie kelkaj internigitaj belgaj samideanoj bone laboris kaj esperantigis multajn el siaj kamaradoj. El ili oni formis klubon.

La ideo de Esperanto tamen pli kaj pli penetras en la publikon. Kontraŭstaro ĉiam pli kaj pli malaperas. Tio estas io, sed ne multe kaj ne sufiĉe. Al la Esperanta movado en nia lando mankas eminentaj personoj. kiuj pro sia personeco, pro sia socia pozicio, pro sia konateco k. t. p. povus instigi la nacian eliton.
— *Holanda Esp. Federacio, H. Mees.*

Norvegujo.

La movado estas sufiĉe malvigla, nun kiel antaŭe, escepte en Kristiania, kie la loka filio de Norvega Esp.

Ligo daŭrigas sian agadon energie kaj persisteme, nun eĉ per kvin kursoj ĉiusemajne, dum aliflanke la ordinaraj kunvenoj estas tre malmultenombre vizitataj. Kurso, gvidata de F-ino J. Finholt, estas starigita sekve de la alvoko de S-ro S. R. Marshall pri la bezono de neŭtrala komerca lingvo post la milito. Certe ne maloftaj estas aliĝoj al N. E. L. kaj abonoj al nia gazeto „*La Espero*“, skandinava organo, sed ne estas kaŭzo supozi, ke tion okazigas la milito. Cetere la geografia situacio de nia lando kaŭzas, ke troviĝas multe da izolaj Esperantistoj, sed malmulte da grupoj.

La sintenado de la norvega gazetaro estas kutime nefavora al nia movado, kaj tiurilate la mondmilito apenaŭ faris ŝanĝon. Sed ankaŭ favoraj esceptoj okazas nun kiel antaŭe. La Trondhjema taga gazeto „*Dagsposten*“ ofte enpresas propagandajn artikolojn jen de kronika, jen de lingvosciencia enhavo; plie notindaj estas la du lingvopolitikaj organoj „*Riksmdalsbladet*“ kaj „*Den 17de Mai*“, kaj kelkaj fakaj organoj.

En Kristiania nun okazas kurso por progresintoj kaj kvar por komencantoj. Instruistino ĉe popola lernejo instruas ankaŭ okjarajn knabinetojn, kiuj progresas mirinde. Estis fondata la 1-9-15 Esp. Unuiĝo de Norvegaj Instruistoj, kiu nun havas la taskon aranĝi la kursojn, sed ĝi cetere agas kun la loka filio de N. E. L. Esperantaj ekzamenoj ne okazas regule. La vendado de literaturaj kaj aliaj Esperantaĵoj sukcesas sufiĉe bone. En Trondhjem la grupo restariĝis. Ankaŭ en Larvik kaj el Holmerstrand ni aŭdis pri antaŭsignoj de starigotaj grupoj. En Rjukan estis starigita dum printempo 1915 klubo kaj kurso, sed pri la nuna stato

ni aŭdis nenion. — *Norvega Esperantista Ligo.* —
H. Bonnevie, administranto.

Portugalujo.

Oni ne povas diri, ke la eksplodo de la milito ĝenis la propagandon; tamen oni povas aserti, ke la centro de la propagando translokiĝis. Antaŭ la milito la Esperantistoj de Porto ageme laboradis kaj la tiam nov-kreita „Portugala Esp. Asocio“ plenumadis sian taskon; ĝi troviĝis en plena aktiveco kaj la regula aperado de „Portugala Revuo“ subtenadis la reton, kiun ĝi etendis tra la tuta lando. Tuj post la deklaro de la milito la afero ŝanĝiĝis. La „Portugala Revuo“ aperis ne pli ol unu fojon, kaj ĝia manko fariĝis grava por nia movado. La Portaj Esperantistoj ne povis, pro diversaj naciaj motivoj rezultantaj el la milito, daŭrigi tiun aktivecon, kaj la centro de la movado fariĝis de tiam en Lisbono dank'al la bona laborado de „Lisbona Esp. Societo“. Tiu laborado bonsukcese daŭras, kaj „Lisbona Esp. Societo“ estas nun preskaŭ la sola forta Esperantista voĉo en Portugalujo.

La milito kreis ankaŭ en Portugalujo tute novan situacion, kies karakteriza aspekto estas la ĉiuspecaj malfacilaĵoj kaj la konstanta dubo pri la politikaj aferoj. Tiu situacio havis ankaŭ gravan influon sur nia organizaĵo. La rilatoj de „Portugala Esp. Asocio“ kun la grupoj malaperis, la administrado nuliĝis.

La portugalaj Esperantistoj ĉiam profitis kiam eble la militon kiel agadkampo, kaj multajn artikoletojn ili sendis al la naciaj gazetoj. Tiuj gazetoj, krom tre

malmultaj, estas favoraj aŭ almenaŭ ĝentilaj. La redakcioj neniam fermas al ni siajn pordojn.

De post la milito ĝis nun funkciis naŭ kursoj krom la „Kurso per Korespondado“ sub la aŭspicioj de „Lisbona Esp. Societo“. Nun funkcias komplementa kurso, kaj dum oktobro - novembro novaj kursoj malfermiĝis. Fondiĝis du grupetoj en Constancia kaj Alcobaca. Kelkaj paroladoj kaj multaj gazetartikoloj estas faritaj. Neniam montriĝis tiom da Esperanta aktiveco en Lisbono kiel nun. En la ceteraj lokoj preskaŭ nenio notinda.

La nacia societo ankoraŭ nenion fiksan decidis pri la ekzamenoj. Ekzamenoj estas efektivigataj, sed ili ne obeas al komuna programo. Tiu afero kredeble baldaŭ estos diskutata kaj ia firma decido definitive alprenita.

La vendado de Esperantaj verkoj pligrandiĝis iom, tial ke ĝi respondas al la progresoj atingitaj, sed la troa altiĝo de l'monkurzo malhelpas ĝin.

Oni faris iom da propagando pri la Ruĝa Kruco kaj Esperanto, paroladojn, artikolojn, k. t. p. Ruĝa Kruco sin montras favora al ni, kaj nun ĝi donacas al ĉiu persono, kiu membriĝas, ekzempleron de l'ŝlosilo portugala - esperanta pri Ruĝa Kruco, sed la plej grava afero, kiu iĝis vera agitado, estas la enkonduko de Esperanto en la Poŝtan Cenzuron. Post la deklaro de milito kontraŭ Portugalujo, la portugala registaro decidis cenzuri la korespondaĵojn, kaj tial ĝi publikigis dekreton, laŭ kiu nur portugala, franca, angla, hispana aŭ itala lingvoj estas permesataj. Lisbona Esp. Societo tuj sin turnis al la respektiva ministro, petante la en-

kondukon de Esperanto. Post multaj penoj, granda batalado en la gazetoj kaj paroladoj, la registaro fine permesis, ke Esperanto ankaŭ estu akceptata de la Poŝta Cenzura Komitato. Tiu ĉi fakto, t. e. la nepermeso de l'uzado de Esperanto eĉ estis tre utila al ni, ĉar ni profitis ĝin kiel pretekston por bruado kaj elmontro de Esperanta vivo. — *B. Martins d'Almeida*, Del. Lisboa.

Svedujo.

La situacio ŝajnas almenaŭ tute kontentiga. Certe troviĝas kelkaj malfortaj detaloj, sed ĉar ni konscias pri ili, ni esperas, ke rimedoj estos troveblaj por plifortiĝo. La milito je kelkaj cirkonstancoj malhelpis nian movadon. Ĉe la militkomenco oni kelkloke plendis, ke la tagnovaĵoj absorbis la ĝeneralan atenton kaj ke la intereso pri Esperanto tiel ĉesis. La personaj rilatoj kun alilandaj samideanoj multokaze ĉesis, ankaŭ rilate al kelkaj neŭtralaj landoj.

S. E. F. regule funkciis, eble eĉ pli bone ol antaŭ la milito. La gazeto „*La Espero*“, organo de S. E. F. kaj Norvega Esp. Ligo, regule aperis ĉiumonate. La ĝenerala gazetaro nun montras estimon por Esperanto. Je tio supozeble kunefikis, ke la milito iom post iom silentigis la svedan profesian Idiston kun liaj asertoj pri la fakte okazinta morto de Esperanto. La sveda Ruĝa Kruco (prezidanto L. R. M. la duko de Västergötland) en alvoko pri librokolektado por militkaptitoj menciis, ke lernolibroj por Esperanto-studado estas dezirataj. Tiun alvokon presis ĉiuj gravaj gazetoj.

Ni ricevis raporton pri 17 pli-malpli gravaj kursoj dum 1916, kvin novaj grupoj fondiĝis, kaj unu mal-

nova grupo revekiĝis. Ekzamenoj ne estis organizitaj. La restantaj provizoj de lernolibroj estas preskaŭ elvenditaj; mankas nun instrumaterialo por projektitaj kursoj. Tiu elvendado rezultis precipe de la propagandvojaĝo de la „blanka generalo“ Pastro A. Wickmann, gvidanto de kontraŭmilita movado. Nova lernolibro kompilita de S-ro Backman estos baldaŭ eldonata. Nova sveda-Esp. vortaro de sama aŭtoro estas atendebla.

Ĉe la militkomenco svedaj Esperantistoj estis tre ofte petitaj, ke ili peradu korespondadon inter militantaj landoj. Tiuj servoj ĉesis, kiam la Ruĝ-Krucaj societoj organizis tiun interŝanĝon. Kiam en la unuaj semajnoj de la milito la rusaj forkurantoj el Germanujo travojaĝis Svedujon, kelkaj servoj al ili estis faritaj, kvankam ĝenerale la policaj aranĝoj malfaciligis la rilatojn kun la forkurantoj. Sveda Esperantisto partoprenis (en servo de sveda Ruĝa-Kruco) ĉe vojaĝo por disdoni donacojn al la germanaj kaj aŭstriaĵaj kaptitoj en Ruslando. La Del. de UEA sciigis, ke multe pli ofte ol antaŭ la milito li estis petata pri servoj precipe de rusaj membroj de UEA. La sekretario de la Ford-Konferenco petis, ke S-ro Nylén traduku Esperanten paroladon faritan de S-ro Haakon Loken, poste eventuale aliajn tekstojn. Ĉe interparolado de S-ro Deputato Morgari el Torino (estanta en Stockholm kaŭze de la Ford-Konferenco) kun sveda politikisto, nun en malliberejo, la Stockholma Delegito de UEA ĉeestis kaj servis kiel interpretanto.

En la unua parto de 1916 okazis propagandvojaĝo de Pastro A. Wickmann, estro de la kontraŭmilitista

organizaĵo „La blanka armeo“. Tiu propagando celis aplikon de Esperanto por speciala movado, sed ĝi samtempe rimarkeble akcelis la ĝeneralan movadon. En la somero okazis la Sveda Esperanto - Tago en Stockholm (jarkunveno de S. E. F.) kun 40 partoprenantoj. Ĉiuokaze multe da propagando estas farita en Svedujo, estis multe da semado, sed rikolto preskaŭ mankis ĝis nun. Por rikolti fruktojn de la farita propagando, urĝas plivigliĝo de la internaciaj rilatoj, kaj je tiu ĉi punkto oni devas konstati, ke la milito havis malbonan influon ankaŭ je la Esperanto-movado en nia neŭtrala lando. — *Sveda Esperanta Federacio*, J. Lundgren, prezidanto.

Rusujo.

* El la informoj publikigataj de la gazeto „*La Ondo de Esperanto*“, kiu regule aperis ĉiumonate dum la milito, rezultas, ke la movado kontentige progresas. Multnombraj kursoj okazis, interalie en la jenaj urboj: Astraĥan, Baku, Barnaul, Blagoveŝĉensk, Ĉita, Jurjev, Kiew, Kirsanov, Kostroma, Moskvo, Orel, Ostrogojsk, Petrograd, Pjatigorsk, Riga, Ŝusov, Taŝkent, Tiflis, Vitebsk, Voroneĵ, k. t. p. En Petrograd la societo „Espero“ festis la 25-jaran jubileon de sia fondo. Propagando estis farita ĉe kelkaj militkaptitejoj, kaj, ĉe iuj, kursoj estis aranĝitaj.

La oficejo de la Ruslanda Eksporta Ĉambro en Petrograd decidis akcepti Esperanton inter la korespondlingvoj.

La plej disvastigata rusa medicina gazeto „*Russkij Vrač*“ regule presas en nia lingvo resumon de la ori-

ginalaj artikoloj. Sufiĉe granda nombro de gazetoj publikigis favorajn artikolojn kaj notojn.

La Moskva Librejo „Esperanto“ sciigis, ke dum la lastaj monatoj la intereso de la publiko al Esperanto mirinde kreskis kaj ke la stato de nia movado proksimiĝas al la antaŭmilita.

Svisujo.

La milito influis grave nian movadon nur en la komenco, ĉar la societa vivo haltis; du grupoj devis pro ofta foresto de kelkaj grupanoj ĉesigi dummilite la grupajn kunsidojn.

Pro tiu ĉesigo de grupaj kunsidoj estis neeble al la Centra Oficejo de S E S efektiviigi seriozan laboron; ĝi limigis siajn klopodojn al la nepre necesa reorganizo de la grupoj kaj de la Centra Oficejo. En 1915, ĉar la ekscito malgrandiĝis, la C. O. troviĝis en la ebleco interrilati denove kun la grupoj kaj ilin instigi al la rekomenco de la grupaj kunsidoj kaj de la varbado. La nuna stato de la svisa movado povas esti konsiderata kiel bona; dank'al la propagando farita de la C. O. per gazetaj artikoletoj kaj per lumbildoj ni atingis grandan nombron de informpetoj, kiu grave superas tiun de antaŭaj jaroj. Multaj el la demandintoj aliĝis al S E S. Malgraŭ la milito la nombro de niaj membroj ne malgrandiĝis, kaj proksiman jaron ni kalkulos pli ol 500 pagintajn membrojn. Ĉiuj svisaj grupoj aliĝis al la Nacia Societo. Novaj grupoj fondiĝis en Lugano (1914) kaj Nyon (1916). En tiu jaro sep kandidatoj en Bern sukcesis la unuagradan

ekzamenon. Ni korespondas de tempo al tempo kun la internigitoj kaj transsendas al ili lernolibrojn, gazetojn, k. t. p. Esperanto estas instruata en Davos inter la internigitoj. Nia intenco propagandi Esperanton en ĉiuj lokoj de internigitoj malsukcesis ĝis nun pro la indiferenteco de la svisa militista estraro. Sed ni ne forgesos rekomenci niajn klopodojn. — *Svisa Esperanta Societo, Jules Perlet, sekretario.*

Ameriko.

* En **Usono** la movado daŭrigis sian iradon, ne multe influite de la militokazantaĵoj. La gazeto „*Amerika Esperantisto*“ regule aperas. Kongreso de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko okazis dum 1916 en Annapolis kun bona sukceso. Oni decidis la daŭrigon de la garantia fondaĵo, kiu nun sumas 775 dolarojn.

Kiel kutime, multnombraj kursoj, kunvenoj kaj gazetartikoloj. La dek-unua kongreso de Esperanto okazinta en San Francisco dum 1915 kaj la propagando farita ĉe la Universala Ekspozicio plivigligis la movadon en Kalifornio kaj Pacifikaj regionoj. Oficialaj kursoj okazas en la komerca altlernejo en San Francisco kaj en la Kalifornia Universitato Berkeley. La 8-a kunveno de la Amerikaj Bahaistoj en Chicago alprenis Esperanton kaj konsilis la lernadon al ĉiuj samreligianoj. Krom la jam citita „*Amerika Esperantisto*“ aperas ankaŭ kelkaj pli malgrandaj gazetoj: „*Pacifika Espero*“, „*Skandinava Esperantisto*“, „*La Babilanto*“.

En **Argentino** nia lingvo disvastiĝas, precipe en la ĉefurbo, Buenos-Aires, kie okazas pluraj kursoj kaj aperas „*Esperanta Bulteno*“. Novaj grupoj fondiĝis en Pergamino kaj Zarak.

En **Brazilujo** kursoj okazas en kelkaj urboj. La gazeto „*Brazila Esperantisto*“ daŭrigas aperi. La enlanda ĵurnalaro estas ĝenerale favora. Kongreso de la Brazilaj Esperantistoj devis okazi en januaro 1917 ĉe Aracaju. Notinde estas, ke la kvara Brazila Geografia Kongreso en Recife voĉdonis deziresprimon favoran al nia lingvo.

En **Peruo** la gazeto „*Antaŭen Esperantistoj*“ aperas.

En **Urugvajo** kursoj okazas ĉe la ĉefurbo Montevideo.

Fine, el insulo **Kubo** ni ricevis unuan N-ron de bela ilustrita gazeto titolata „*Latin - Amerika Esperantisto*“ servonta kiel ligilo inter la hispan-amerikaj Esperantistoj, sed ŝajnas, ke tiu entrepreno ne povis esti daŭrigata.

Aliaj kontinentoj.

* En **Japanujo** ni scias, ke kursoj okazis en Jokohama, Osaka kaj Tokio. Aperas la japana-esperanta gazeto „*Orienta-Azio*“.

En **Hinujo** la movado daŭrigas, sed ni posedas malmultajn informojn. Esperanta Bulteno aperas sub la titolo „*Hina Brileto*“.

En **Persujo** nia lingvo ekdisvastiĝas ĉe Bahajanoj, precipe en Teheran.

En **Sud - Afriko** oni propagandas, speciale ĉe Beaufort - West, Cape - Town, Johanesburg, Natal, Pretoria.

En **Aŭstralio** ekzistas kelkaj grupoj, kiuj daŭrigis sian normalan agadon.

IEMW-Don

3